



# PENSEO

N-ro 137

Feb./2003

Monata Beletro Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 <http://anteo.topcities.com>

## INTERVIDIĜO EN LA HOTELO BLANKA CIGNO

Harpina

Japana esp-isto s-ro Harada Hideki estas malnova amiko de mia instruisto s-ro Hu Guozhu. Ili ne vidis unu la alian jam dum multaj jaroj. Je la tria tago de la nova jaro 2003, s-ro Guozhu kaj Peng Zhengming, la sekretario de Hubei-a Esp-Asocio, veturis trans mil kilometroj de Wuhan al Kantono, speciale por intervidiĝo kun Harada por ĉirkaŭ unu horo, profitante la ŝancon kiam ges-roj Harada turisme vojaĝis al Ĉinio.

Ges-roj Harada restis en Kantono nur unu vesperon. Laŭ plano la intervidiĝo devus okazi je la 8-a horo vespere en la granda halo de la hotelo Blanka Cigno, sed, pro la malfruiĝo de la flugmaŝino, la intervidiĝo prokrastiĝis preskaŭ je pli ol duona horo. Jenaj geesp-istoj ĉeestis en la intervidiĝo: rusa esp-istino Tanja, ges-roj Harada el Japanio, Hu Guozhu kaj Peng Zhengming el Hubei, poeto Lu Jixin el Guang'xi, kaj kantonaj geesp-istoj Saŭkio, Lin Liyuan, Jian Weijian, Harpina k.a. Je la unua minuto, kiam la gastoj kaj bonvenigantoj ektrovis unu la alian, la du malnovaj amikoj japana kaj ĉina firme ĉirkaŭbrakumis, tiam multaj fotiloj senĉese ekflagris, restigante la neforgeseblan scenon.

Bonvenigantoj kaj gastoj komencis interŝanĝi donacojn kaj kunfotiĝi. S-ro Hu Guozhu ĉiam estis serioza en preparado. Li donacis al Harada negrandan kajeron *Manskriba Poemaro* de Guozhu, kiun li zorge antaŭpreparis kaj li koncize konigis la ĉefan

enhavon al la amiko. Aŭskultante, Harada ridetis kun granda ĝojo. Manskribaĵo de s-ro Guozhu estis en stilo flua kaj fluga kiel verko de belskribisto, kun lerto de dekoj da jaroj.

La libroj donacitaj de Harada al ni estis tre delikataj, kaj multaj el ili estis eldonitaj en nomo de Esp-asocioj. Kompare kun tiuj, kiujn ni donacis al li, estas evidentaj distancoj en la presa kvalito. Ke ili tiel atentis pri la eldonado de Esp-aj presaĵoj, tio estas ekster mia atendo. Ges-roj Harada ambaŭ estas esp-istoj, amantoj de turismo. La bela s-ino aspektas pli juna ol en ŝia reala aĝo. Ŝi estas tre afabla kaj parolema. Mi interbabilis kun ŝi pri temoj ŝatataj de ni ambaŭ.

Forflugis rapide unu horo. La intervidiĝo iris en tre amika atmosfero. Koscianta pri la laciga longa veturo, ni volis adiaŭi, sed la gegastoj foj-refoje retenis nin. S-ino Husako parolis al mi, "Interkonatiĝo estas nia grava takso en tiu ĉi vojaĝo." Mi respondis, "Vi certe estas laca kaj dormema, ni ne volas plu ĝeni vin." Poste, gastoj kaj bonvenigantoj en granda disiĝ-bedaŭro diris, "Ĝis revido!"



EL LAŬZI

### ĈAPITRO 66

(En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi esprimas siajn opiniojn pri la politiko de la regado de la popolo. Por regi super la popolo,



oni devas montri sin modesta; por stari  
antaŭe de aliaj, oni devas loki sin  
malantaŭe de ili. Laŭ li per  
“nekonkurado” oni povas atingi la celon,  
al kiu oni strebas.)

La kaŭzo, kial la riveregoj kaj la maroj povas  
esti la reĝoj de ĉiuj riveretoj,

Kuŝas en tio, ke ili scias resti pli malalte.

Jen kial ili povas esti la reĝoj de ĉiuj riveretoj.

Tial la Saĝulo, por regi super la popolo,

Nepre devas montri sian humiliĝon per siaj  
paroloj;

Kaj por gvidi la popolon,

Li nepre devas loki sin malantaŭ ili.

Tial, la Saĝulo<sup>1</sup> estas super la popolo,

Sed la popolo ne sentas Lin ŝarĝo;

Li estas antaŭ la popolo,

Sed la popolo ne sentas lin malhelpo.

Tial ĉiuj sub la Ĉielo respektegas Lin kaj ne  
estas tedataj de Li.

Kaj ĝuste ĉar Li ne konkuras kontraŭ aliaj,

Neniu sub la Ĉielo povas konkuri kontraŭ Li.

<sup>1</sup> Vd. noton de ĉap. 2.

## ĈAPITRO 67

(Tiu ĉi ĉapitro pritraktas la aplikadon de  
la principo de la Taŭo al la politiko kaj la  
milito. Laŭzi proponas la tiel nomatajn  
tri trezorojn, kiuj estas “toleremo”,  
“ŝparemo” kaj “ne kuraĝi esti antaŭe de  
ĉiuj sub la Ĉielo”, opiniante, ke la  
malobservo de tiuj ĉi tri pincipoj certe  
kondukas al plena malsukceso.)

Ĉiuj sub la Ĉielo diras, ke mia Taŭo estas  
granda,

Sed ĝi ne estas kiel io ajn konkreta.

Ĝuste ĉar ĝi estas granda,

Ĝi ne estas kiel io ajn konkreta.

Se ĝi estus kiel io konkreta,

Ĝi estus tre malgranda jam de longe.

Mi havas tri trezorojn, kiujn mi gardas en mi:

La unua estas “toleremo”,

La dua estas “ŝparemo”,

La tria estas “ne kuraĝi esti antaŭe de ĉiuj sub  
la Ĉielo”.

Kun toleremo oni povas esti brava,

Kun ŝparemo oni povas esti grandanima,

Kun la nekuraĝo esti antaŭe de ĉiuj sub la  
Ĉielo, oni povas esti la ĉefo de ĉiuj estaĵoj.

Nuntempe, penante esti brava sen toleremo,

Penante esti grandanima sen ŝparemo,

Kaj penante esti la unua sen cedemo,

Oni iras nur al la morto.

Kun toleremo oni povas venki en milito

Aŭ sin plifortigi en defendo.

Kiam la Ĉielo degnas savi iun,

Ĝi ŝirmas lin per toleremo.



tradukis Wang Congfang

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## Malfacile Eldirebla Kio en Koro

Guozhu

En lastaj jaroj tre furoras verkado de prozo  
kaj eseoj. Ankaŭ mi tre ŝatas legi tiajn verkojn  
kun plezuro. El la majstraj eseoj furorantaj, al  
mi plej plaĉas tiuj verkitaj de la maljuna s-ro  
Zhang Zhong'xing. Mi aprecas kun admiro ke  
li vere lertas rakonti kaj rezoni. Legante liajn  
verkojn, ni kvazaŭ frontas al afabla  
grandaĝulo, kiu babilas al ni pri sia spertoriĉa  
vivo tra la homa mondo. Lia parolo estas  
plena de saĝo sed ofte ne sen humoro. Lia  
tono ĉiam estis tiel milda, trankvila, sincera  
kaj senurĝa, kondukante allogan babiladon.  
Aferoj, eĉ tre banalaj, nur se sub lia plumo,  
fariĝas gustoplenaj kaj interesaj. Frontante  
kontraŭ tia saĝa grandaĝulo, ni sentas nin  
kvazaŭ banita kaj benita de printempa zefiro.

El liaj eseoj, la “S-ro Maljuna Winter”  
precipe plaĉas al mi. La nomita eseo fakte  
estas ne longa, kaj certe ne okupas la plej

gravan lokon inter la verkoj de s-ro Zhang Zhong'xing. Kaj, inter s-ro Maljuna Winter kaj s-ro Zhang Zhong'xing tute ne ekzistis multjara konateco de intimaj malnovaj amikoj. Por diri veron, ili estis nur preterpasantoj kiuj de tempo al tempo renkontis sin sur la sama vojo al laboro. Maksimume dirite, ili estis nur vojirantoj kun kapbalanca saluto reciproke. El vido de preterpasanto pri alia vojiranto kapsigne salutanta, nature oni ne povas ellabori gigantan kritikan biografion. Pli kredeble oni nur povas skribi siajn proprajn pensojn prenante la titolon kiel inspiran temon. Kaj, kio plej kortuŝis min, ĝuste estas la liberaj pensoj kun emocio de la verkanto, fine de la eseo, ne tiom koncernantaj al la pli aŭ malpli detalaj vivospuroj de la verkato.



S-ro Maljuna Winter estis usonano, naskiĝis 1887, venis al Ĉinio 1923, instruis en Ĉinio pli ol 60 jarojn, fine mortis kaj enteriĝis en Ĉinio. Homo havas sian individuan karakteron. S-ro Maljuna Winter emis trinki lakton, kaj manĝi branon. Tio ankoraŭ ne surprizas. Li vivis fraŭle dum multaj jaroj, kaj ne havis iun parencon en Usono. Tio vekis dubon ĉe s-ro Zhang: Kial li vivis tiel izole? Ĉu li pledis por la vivmaniero de dumviva fraŭleco? S-ro Maljuna Winter estis intima amiko de fama profesoro Wen Yiduo (1899-1946). Li venis al Ĉinio ja dank' al rekomendo de prof. Wen Yiduo. Post kiam Wen Yiduo estis murdita, dum multaj jaroj la cindro estis konservita en loĝejo de S-ro Maljuna Winter, tio atestas ilian neordinaran interrilaton. Foje en letero Wen Yiduo skribis ke Profesoro Winter havis "tre romantikan junecon", kaj s-ro Maljuna Winter neniam negis aŭ klarigis tiun aserton. S-ro Maljuna Winter iam havis grandan feran

ĉing-on (antikva frapinstrumento por budaismo), kaj li klarigis al Wen Yiduo pri la utilo de la fera ĉing-o, ke li povis, en la sendorma nokthoro, frapi ĝin kaj aŭskulti ĝian muzikon.

Sed por kio necesas aŭskulti la muzikon de ĉing-o en la kvietaj noktmezoj kiam ĉiuj aliaj jam endormiĝis? Tre eble la aŭskultanto havis ion neeldireblan en sia koro. Kaj opinias s-ro Zhang, kiu havis scion pri budaismo, ke la muziko de ĉing-o povas, ĝenerale dire, trankviligi koron; kaj, plidetale dire, rompi turmenton de amsopiro. La subaj versoj de Tang-dinastio

Ĉirkaŭe tra silento en aŭroro  
aŭdiĝas nur preĝeja tintsonoro  
sugestis ja pri tia animstato.

Laŭ opinio de antikvaj ĉinoj, la plej granda aspiro de la homo konsistas el nenio alia krom la duo: manĝado kaj geamo.

Kaj s-ro Zhang opinias, ke, por kontentigi la deziron de manĝado, nur se vi havas monon, vi sukcesos atingi la celon ĉu pli aŭ malpli frue en via vivo. Tamen, rilate la geamon, estas tro malfacile ke oni dirus sian kontentiĝon per "sen bedaŭro". Ĉar por tio necesas helpo de antaŭdestino plus bonŝanco. Male, kaj Mamono kaj potenco neniam helpas tiakaze. Do, nenio alia povas superi ĝin kiel la plej granda bedaŭro por homa vivo.

Se vi pensadus profunde, vi devas konstati, ke lia juĝo vere pravas. Kalkulu laŭ amplekso tempe de pratempo ĝis hodiaŭ, loke de nia ĝis fremdaj landoj, persone de kiuj konataj ĝis nekonataj sed nur iomete informitaj de vi, kaj poste diru: kiom da feliĉaj paroj en fea geedzeco finfine ekzistas? (Eble la paro de poetino Li Qingzhao (1084-cx.1151) povas esti kalkulata kiel unu?) Tamen, kiom da estas tiuj kun finiĝo en feliĉo? (Al geedzoj Li Qingzhao trafis la granda malfeliĉo ruinigoj kaj de patrujo kaj de propra familio, tiel ke ŝi versis la faman ci-on Lanta Son-treniĝo: Triste, triste, morne, morne...) Vere nombrebila per

niaj fingroj, jes, per pokaj fingroj!


Tiuflanke ne pli bone statas eĉ tiaj nobluloj kiaj reĝoj aŭ imperiestroj, al kiuj apartenas la tuta lando kiel propraĵo, kaj neniu rajtas malhelpi lin (aŭ ŝin) vivi en senlima poligamio (aŭ en senlima poliandrio). Kiom da el ili rajtas diri pri plena ĝuo de tute laŭdezira kontentiĝo en sia geama vivo? Ni rigardu al ne tro malproksima erao de Qing-dinastio, kiel vivis la pluraj imperiestroj en la lastaj eraoj? Ho ve! Mankis al ili la libero por elekti parulinon, mankis al ili la libero de enamigo, mankis al ili eĉ la libero de seksa vivo. Ĉio estis sub rigora kontrolado de la Imperiestra Patrino! Ili vivis eĉ malpli libera ol ordinara popolano, kiu ankoraŭ povas verse vei pri la “malica orienta vento, turmenta momento” ktp.

Tiuj malĝojoj kaj afliktoj en privata sento, ofte estas plej malfacile direblaj. Kontraŭ tia sufero, iuj volas rezisti, aliaj rifuĝi, la triaj forigi (unu el la forigaj rimedoj estis aŭskulti la muzikon de ĉing-o tra noktomeza silento). Sed plej ofte oni nek rifuĝis nek forigis nek diris, oni nur kaŝis tion profunde en sia korfundo, ke ili fariĝu privataj sekretoj.

Ni devas kredi, ke ĉiuj homoj havas siajn proprajn privatajn sekretojn. se ekzistas ia diferenco, nur je tio ke iuj havas pli dum la aliaj malpli multe da privataj sekretoj. Kaj tio vekis bedaŭron de s-ro Zhang pri homaj biografioj, ke preskaŭ ĉiu biografio montras en unuflankeco nur “la korpan” sed ne “la Koran” historion. Kial la kora historio restas malfacile eldirebla? La kialoj estas du: unue necesas la kapablo, due la deziro. Ekzemplojn de tiuj kiuj kapablas ni vidas aŭ en poemo Feniksa Harpinglo far Lu You (1125-1210), aŭ en poemo Pusaman far Li Yu (937-978). Rilate la deziron, ne sufiĉas ke nur la koncernanto mem havas, sed necesas ankaŭ la konvena socia medio. Do estas evidente, ke la malfaciloj ekzistas ne nur ene, sed ankaŭ ekstere.

Skribante pri geamo, eĉ se vi estas tute sentima pri probabla damaĝo al vi mem, tamen ,ofte okazis, ke vi ne povas ne skrupuli pri la eventuala vundo al la dua, la tria koncernato... aŭ al pli multaj senkulpaj kromhomoj. Kaj tio rezultigis konsekvence ke en la mondo tro multe da sekretoj ekzistis nur en koro de individuo aŭ nur inter la koncernatoj, kaj malaperis por eterne kune kun ilia forpaso. Jen kiom granda bedaŭro ! Pri iu homo, eĉ grava persono kun dikaj biografioj, oni povas koni fakte nur en ega unuflankeco aŭ duona scio.

En tia senhelpeco, s-ro Zhang konsilas al ni, ke ni, kiel leganto, restu kontenta pri tia duona scio. Rilate s-ron Maljuna Winter, kvankam li vivis multajn jardekojn en fraŭleco, tamen li ja havis romantikan paseon. S-ro Zhang esperas, ke tiu romantika paseo, restigis al li, ne nur amarajn dolorojn, sed ankaŭ dolĉajn rememorojn.



Eldonas Redakcio de *Penseo*  
Disdonanto Lin Liyuan  
Adreso: Ĉambro 501, N-ro. 72,  
Strato Xitangxilu, Guangzhou,  
Guangdong (510050)

.....  
POŝT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!  
.....

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)  
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou  
Universitato, Guangdong 515063, Ĉinio  
Tel: (0754) 2903012 (hejme)  
E-poŝto: ydwei@stu.edu.cn  
Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

